

Rerum Novarum

Oldřich Arnošt Fischer

Prelego por Societo por la internacia lingvo Esperanto en Brno, la 21-an de majo 2014

Enkonduko

Pri teĥnika progreso

La 19-a jarcento estis epoko de rapida teĥnika evoluo. Homoj jam sciis fortojn de vapormaŝino kaj elektroenergio. Pri provizoj de nigra kaj bruna karboj oni pensis, ke ili estas neforkonsumataj. Kolonioj donis multe da krudmaterialoj, kiuj estis prilaborataj en fabrikoj.

Teĥnikisto Josef Božek (1782-1835) prezentis siajn vaporajn ĉareton kaj ŝipeton al praganoj jam en la jaro 1817. Josef Ressel (1793-1857) esploris ŝiphelicon.

Danke al František Josef Gerstner (1756-1832) kaj František Antonín Gerstner (1795-1840) la unua ĉevala fervojo inter České Budějovice kaj Linz ekzistis ekde la jaro 1825.

Entreprenanto Vojtěch Lanna (1805-1866) transportis lignon el suda Bohemio en Hamburgon kaj konstruis riverajn ŝipojn.

Jan Perner (1815-1845) projektis fervorojn por vaporaj lokomotivoj.

Vincenz Daněk, František Ringhoffer, Karel Václav Zenger, Emil Kolben, Václav Mrázek, Emil Škoda k.a. estis pioniroj de nia moderna industrio. Pli ol 50 maŝinaj ŝpinfabrikoj laboris en Bohemio en la jaro 1836. Post la jaro 1840 okazis vera industria revolucio.

Sed tiu progreso alportis novajn sociajn problemojn. Laboristoj, nova socia tavolo, estis senskrupule ekspluatataj en la fabrikoj. Ne nur viroj, sed ankaŭ virinoj kaj infanoj laboris en malbonaj laboraj kondiĉoj. Multe da eksaj vilaĝanoj, kiuj forlasis siajn kampojn esperinte, ke en fabrikoj aŭ minejoj ili gajnos multe da mono fiaskis kaj fariĝis duonsenhejmuloj.

Liberalismo

Al riĉuloj plaĉis nova filozofia direkto, liberalismo, kiun kreis Adam Smith en Grandbritio en la 18-a jarcento. Tiu filozofio nomiĝas laŭ la vorto „libereco“. Sed multe da homoj pensis tiam (kaj pensas eĉ nuntempe), ke la libereco donas al ili ŝancon senskrupule priŝteli aliajn homojn, trompi kaj ŝteli. Granda diferenco estis inter laborordonantoj (posedantoj de produktiloj) kaj proletoj, homoj, kiuj posedis nur siajn idojn (greke: proles - idoj).

Kristana rezisto kontraŭ maljusteco

Tial multe da pastroj (2500 patriotaj pastroj) kaj kredantaj laboristoj en niaj landoj opiniis, ke la Dio ne kreis la homon por sklaveco kaj estas necesa batali kontraŭ maljusteco.

Kredantaj laboristoj ekorganizis. Ili fondis ekzemple Unuiĝon de katolikaj metilaboristoj (ĉeĥe: Jednota katolických tovaryšů), Konkordon (Svornost) kaj Mutualecon (Vzájemnost). Laboristaj societoj estis fonditaj en Bohemio, kie jam antaŭ la jaro 1914 ekzistis 231 societoj, en Moravio 181 societoj kaj en Silezio 11 societoj. Katolika unuiĝo (Katolická jednota) estis fondita en Brno en la jaro 1849. La Unuiĝo eldonis la ĵurnalon Voĉo de la Katolika unuiĝo (Hlas Jednoty katolické) ĝis la jaro 1918. Tute 24 Katolikaj unuiĝoj havis pli ol 1000 membrojn.

Bonŝance en romkatolika eklezio aperis viro, kiu sentis alvenon de „novaĵoj“ kaj kiel roma papo eldonis enciklikon Rerum Novarum (Pri novaĵoj), kiu malaprobis liberalismon kaj fondis eklezian socialan doktrinon.

Pri la aŭtoro de Rerum Novarum

Lia plena origina nomo estis Vincenzo Gioacchino Raffaele Luigi Pecci. Li naskiĝis en nobela familio en Carpineto Romano en Italio la 2-an de marto 1810. Vincenzo Pecci fariĝis pastro la 31-an de decembro 1837. Li estis kiel vatikana nuncio sendita en Belgion, por ke subtenu tieajn episkopojn kontraŭ belga registraro, en la jaro 1843. Li estis tiel sukcesa, ke belga reĝo Leopoldo I oficiale petis Vatikanon retirigi lin.

Vincenzo Pecci fariĝis episkopo la 19-an de februaro 1846 kaj kardinalo la 19-an de decembro 1853.

Lia pontifikado daŭris 25 jarojn, ekde la 20-an de februaro 1878 ĝis la 20-an de julio 1903, kiam li (93-jara) mortis en Vatikano.

Tiu 256-a papo reorganizis romkatolikan eklezion, subtenis esploradon de astronomio kaj aliaj natursciencoj en Vatikano kaj malfermis grandan parton de vatikanaj arĥivoj por esploristoj. Li fondis 248 diocezojn kaj ĉefdiocezojn kaj du patriarĥejojn.

Unu sian enciklikon, Quae ad nos (kiu estas aldono de tiu prelego), li dediĉis al ĉeĥaj kaj moraviaj episkopoj kaj ĉefepiskopo Leono Skrbenský. La encikliko Quae ad nos (Kiuj al ni), kiu estis eldonita la 22-an de novembro 1902, kritikas sekularismon kaj instigas al aranĝo de episkopa konferenco.

Danke al Leono XIII estis fondita ĉeĥa kolegio, tielnomata Bohemicum, en Romo.

Pri la jaro 1891

La encikliko Rerum Novarum estis eldonita la 15-an de majo 1891.

En la jaro 1891 mortis en Prago ĉeĥa poeto Jan Neruda (1834-1891), kiu en siaj poemoj antaŭdiris, ke la homaro forlasos teron kaj flugos al steloj. Li jam verkis pri telegrafo kaj trajno en siaj poemoj. Sed li ankaŭ priskribis vivon de laboristoj, kiuj konstruis fervojon.

Jubilea ekonomia ekspozicio okazis en Prago en tiu jaro. Germanoj ne partoprenis en tiu ekspozicio. Ni povis tie ekspozici niajn industriajn sukcesojn. Ekzemple elektroteĥnikisto František Křižík (1847-1941) konstruis elektrajn lampojn, kiujn prezentis en Parizo en la jaro 1881. Urbo Písek estis iluminita per tiuj lampoj jam en la jaro 1887. Tramo de Křižík funkciis en arealo de la Jubilea ekonomia ekspozicio en Prago en la jaro 1891. Ne germane, sed ĉeĥe parolantaj civitanoj montris al tuta mondo, ke niaj landoj estas industriaj, ekonomie fortaj landoj.

Enhavo de la encikliko Rerum Novarum

Koncize:

1. La eklezio konscias, ke dum la industria revolucio ekestis nova tipo de socio. La eklezio tial devas adaptiĝi al tiu novaĵo, precipe batali kontraŭ novaj formoj de ekspluatado.
2. La eklezio konscias, ke en moderna industria socio ekestis ega potenco ĉe kelkaj homoj, sed ankaŭ ega dependeco de aliaj homoj de tiu potenco. Ŝtato devas reguligi tion.
3. La eklezio postulas respondecon de ĉiuj, kiuj partoprenas en ekonomia proceso.

Laborista demando bezonas solvado

Konflikto inter riĉuloj kaj proletoj estas danĝera, ĉar radikaloj kaj ruzuloj povas ĝin misuzadi. Uzuristoj senskrupule priŝteladas proletojn.

Socialismo ne solvas problemojn de laboristoj

Socialistoj (kaj aliaj maldekstruloj) havas preparitan simplan solvado: ili volas abolicivi privatan proprieton kaj anstataŭi ĝin per komuna proprieto, kiun mastrumus estraroj

de komunumoj kaj ŝtatoj. Krom tio, ke tiu simpla solvado damaĝus posedantojn, tiu solvado ankaŭ donas al ŝtato taskojn, kiuj ne estas taskoj de la ŝtato.

(Rimarko: Tiuj vortoj estis verkitaj en la jaro 1891, kiam neniu sciis pri revolucio en Ruslando kaj plejado de maldekstrulaj reĝimoj, kiuj en diversaj landoj kaŭzis eĉ malsategojn. Ni, kiuj rememoras socialismon en nia lando (1948-1989), bone scias, ke tiu solvado estis utopio, ke socialismo detruis socion ne nur materiale, sed precipe morale. Reĝimo, en kiu ĉio apartenis „al ĉiuj“ kaj ĉio estis ŝtate planita, fiaskis. Neniu socialista ŝtato vere prosperis (ekz. Sovetunio, Kubo, Korea popoldemokratia respubliko)).

Posedi privatan proprieton ne estas peko

Socialistoj atakas riĉajn homoj kaj ne motivas laboristojn labori, gajni kaj ŝpari monon. Privata proprieto estas en akordo kun natura ordo. Ŝtato ne devas influi familian vivon. Privata proprieto devas resti netuŝebla.

Solvo ne estas ebla sen religio kaj eklezio

Absoluta egaleco ne estas ebla en civitana societo. Socialistoj vane provas ŝanĝi tion, ĉar grandaj diferencoj ekzistas inter homoj. Ne ĉiuj homoj havas egalajn talentojn, sanojn kaj fortojn. Ne ĉiuj homoj tial egale sukcesas. Tial ne povas esti absoluta egaleco. Same ankaŭ sufero ekzistis, ekzistas kaj ekzistos kaj tiuj homoj, kiuj promesas al homaro vivon sen problemoj, nur mensogas. Tial oni devas vidi la mondon reale kaj serĉi kuracilon kontraŭ tiuj problemoj.

La plej granda malbono estas opinio, ke riĉuloj kaj proletoj devas ĉiam esti malamikoj. Tiu ideo estas malvero, kontraŭ prudento. Kiel en homa korpo estas ĉiuj membroj en harmonio, tiel en ŝtato povas esti ambaŭ klasoj en harmonio, ĉar unu bezonas la alian. Kapitalo ne povas ekzisti sen laboro kaj la laboro ne povas ekzisti sen la kapitalo. La konkordo faras ordon kaj belecon, sed la batalo rezultas en krueleco kaj ĥaoso. La forto, kiu kapablas plibonigi kondiĉojn kaj eĉ elradikigi la batalon, estas kristanismo.

La laboristoj kaj la laborordonantoj havas taskojn.

Tasko de laboristo estas plenumi kontrakton pri laboro, ne domaĝi proprajn kaj ne ofendi la laborordonanton, neniam ribeli kaj neniam sekvi malbonajn homojn, kiuj promesas al li nerealaĵojn. (La maldekstruloj ĉiam kapablis bonege promesadi.)

Laborordonanto devas respekti dignecojn de siajn laboristojn. La laboristo ne estas sklavo. Li devas havi liberan tempon, por vizitu de diservoj, sed ankaŭ zorgu pri sia familio kaj estu ŝparema. Laborordonanto devas doni bonan salajron al sia laboristo.

La eklezio klopodas amikigi kaj proksimigi laborordonantojn kaj laboristojn. Kiu posedas proprajn, tiu devas subteni pli nesukcesajn homojn. Vera digneco dependas de moralo.

La eklezio klopodas eduki homojn. Se la societo volas resaniĝi, necesas revenon al kristana vivo aj kristanaj principoj.

Krom tio la eklezio subtenas establaĵojn, kiuj helpas al malriĉuloj.

Rolo de ŝtato

Tiuj homoj, kiuj gvidas la ŝtaton, devas klopodi pri bonfarto de la ŝtato kaj bonfarto de unuopuloj. Ne nur ŝtata administraro, sed ankaŭ bona moralo, bonaj familioj kaj zorgo pri la religio kaj justeco, modera kaj justa dividado de publikaj taskoj, progreso de etindustrio ka agrokulturo gvidas al la bonfarto. La ŝtato devas zorgi pri bonfarto kaj interesoj de laborista klaso. Nacia riĉeco ekestas de laborista laboro. Ŝtata aŭtoritato devas protekti la komunan bonfarcon. En la ŝtato devas esti ordo, la ŝtata aŭtoritato devas elpaŝi, se minacas ribeloj aŭ strikoj de la laboristoj, laboristaj familioj estas endanĝerigitaj, la laboristoj ne havas tempon por religiaj agadoj, moralo estas endanĝerigita, laborordonantoj donas al laboristoj malbonajn taskojn. Sed la aŭtoritato ne devas elpaŝi pli multe ol necese.

Ŝtata aŭtoritato devas protekti privatan proprieton

Se laboristoj planas strikon, la aŭtoritato devas preventi tion, ĉar la strikoj damaĝas laboristojn, laborordonantojn kaj la ŝtaton. Oni bezonas ripoztagojn por religio. Laboristoj bezonas adekvatajn laborpaŭzojn. Infana laboro estas malutila, se la infanoj ankoraŭ ne estas bone evoluitaj. Kelkaj laboroj ne estas konvenaj por virinoj. Salajro devas sufiĉi por laboristo, kiu havas familion. Se la laboristo havas sufiĉe da mono, li povas atingi proprieton. Tio gvidas al pli justa dividado de la proprieto en la societo.

Rolo de memhelpaj organizoj

Memhelpaj organizoj devas helpi al tiuj, kiuj bezonas helpon, kaj proksimigo laborordonantojn kun laboristoj. Tio estas memhelpaj unuiĝoj, kiuj helpas al laboristoj, iliaj vidvinoj kaj orfoj, institutoj por infanoj kaj junularo. Homo, kiu ne estas kaj ne sentas sin sola, estas pli forta. Le memhelpaj organizoj helpas al unuiĝita membraro. La ŝtato devas subteni tiujn memhelpajn organizojn.

Reagoj je la encikliko Rerum novarum

Ne ĉiuj reprezentantoj de la eklezio ekkomprenis la enciklikon. Multe da pastroj ne komprenis, kial eklezio devas interesiĝi pri laboristoj. Malamikoj de eklezio ofte proklamas, ke marksistoj jam pli frue batalis kontraŭ kapitalismo ol kredantoj (ekzemple Komunista manifesto estis eldonita jam en la jaro 1848), sed tio estas malvero. Vere, ke paralele kun maldekstruloj ankaŭ kredantoj estis tre agemaj. František Sušil (1804-1868), Beneš Metod Kulda (1820-1903), Matěj Procházka (1811-1889) k.a. ĉe ni, Wilhelm Emmanuel von Ketteler kaj Adolph Kolping en Germanio kaj multe da aliaj en diversaj eŭropaj landoj batalis kontraŭ kapitalista liberalismo kaj marksisma socialismo.

Ankaŭ nuntempe liberalismo estas propagata. Ankaŭ nuntempe ne estas konkordo inter laborordonantoj kaj laboristoj. Maldekstruloj utiligas malkontecon de laboristoj por siaj politikaj celoj. Tial estas utile scii, ke solvado de socialaj problemoj jam estas proponita en la encikliko Rerum novarum en la jaro 1891. Se homoj en nia lando legus enciklikojn, ili ne povus facile baloti maldekstrulojn.

Literaturo

LEV XIII. (1926): Encyklika Rerum Novarum, paĝoj 17-51. En: SAŤKA, L. (ed.): Papeŝ Lev XIII. dĕlnictvu a zamĕstnanectvu (k oslavĕ 35. vĕroĉĭ vydĕnĭ encykliky „Rerum Novarum“). 1-a eld., Brno, Ĉeskoslovenskĕ odborovĕ sdruŝenĭ křesťansko-sociĕlnĭ v Brnĕ, 51 paĝoj.

LEV XIII. (1996): Rerum Novarum, encyklika papeŝe Lva XIII. o dĕlnickĕ otĕzce z 15. kvĕtna 1891, 1-a eld., Prago, Zvon, 31 paĝoj.

Aldono: Quae ad Nos

Aldono

QUAE AD NOS

ENCIKLIKO DE LA PAPO LEONO XIII AL EKLEZIO DE BOHEMIO KAJ MORAVIO

Raportoj pri situacio en viaj diocezoj kaj forkliniĝo de granda amaso de ritoj kaj procedoj de katolika kredo, kiuj ĉiutage alvenas al Ni, kaŭzas al Ni grandan kordoloron kaj ĉagrenegon.

Ni certe ne dubas, ke vi peneme uzadas ĉiujn diskutojn, por ke korektu malfeliĉon de paŝtaro, kiu estis komisiita al vi, kaj preventu perdojn, kiuj kreskas ĉiutage. Se malamikoj de la kredo ne ŝparas ilian klopodon kaj monon fiksante tutajn siajn pensojn al neniigo de via paŝtaro, vi, kiujn Kristo elektis la Paŝtistoj, ne devas resti neaktivaj, vi devas uzi ĉiujn eblajn ilojn por savo de via paŝtaro. Sed grandeco de la danĝero devigas instigi homojn de bona volo.

Ni certe scias, ke ne ĉiuj diocezoj situas en la samaj kondiĉoj, kiuj koncernas de sekureco de la kredo, tial ne ĉie povas esti uzataj la samaj iloj por konzervado de la kredo. Pro tio ke la danĝero estas ĝenerala kaj tio estas komuna patrujo, kiu vokas al defendo, Ni opinias, ke la plej bona decido estus reciproke interkonsenti kaj kun unuiĝitaj opinioj prizorgi pri tio, kio estas atingenda kaj evitenda.

Tial estas Nia deziro, ke ĉiuj viaj episkopoj de Bohemio kaj Moravio renkontiĝu kiel eble plej baldaŭ, por ke pripensu ĉion por defendo de la kredo de viaj samlandanoj. Kompreneble vi sciu, ke rezultoj de la konsiliĝo kaj faritaj decidoj estos sciigita al Ni, por ke povu esti sanktigita per la apostola aprobo.

Krom tio Ni ne deziras lasi tiun okazon neutiligitan, sen nova rekomendo al vi kiel eble plej peneme zorgi pri kompleta elradiko de fanatika celado, kiu kaŭzas splitadon de pia pastraro ĉe vi; tio dividas kaj malfortigas fortojn de tiuj, kies konkordo estas tre necesa, precipe nuntempe, por defendo de la kredo. Dia Mizerikordo helpu al vi dum plenumo de tiuj taskoj. Kiel esprimo de Nia amo prenu la Apostolan Benon, kiun Ni plej afable donas en la nomo de la Sinjoro al vi kaj via paŝtaro.

Donita en Romo ĉe Sankta Petro la 22-an de novembro 1902,
en la 25-a jaro de Nia Pontifikado.
Leono XIII.

Esperantigis O.A. Fischer.